

- 19) En kiu urbo naskiĝis Zamenhof ? (Bialystok)
- 20) En kiu jaro aperis la unua Universala Vortaro ? (1894)
- 21) En kiu urbo okazis la unua universala kongreso, kaj en kiu jaro ? (Boulogne-sur-Mer 1905)
- 22) Kiel Zamenhof nomis sian idealon de monda frateco ? (homaranismo)
- 23) Kiu la unua (krom la familio) interparolis kun Zamenhof en esperanto ? (Antoni Grabowski)
- 24) Kiu instigis Zamenhof ŝanĝi la vorton "kiam" en sian definitan formon "kiam" ? (Edgar von Wahl)
- 25) Kiu zamenhofa libro, en 1903, donas stilan modelon por verki en esperanto ? (Fundamenta Krestomatio)
- 26) Kiu estas la unua biografo de Zamenhof kaj historiisto de esperanto ? (Edmond Privat)
- 27) Kiu esperanta verkisto estis aktoro ? (Julio Baghy)
- 28) Kiu aŭtoras la Plenan Gramatikon de esperanto en

- 1935 ? (Gaston Waringhien kaj Kálman Kalocsay)
- 29) Kiu verkistino tre ŝatas la katojn ? (Marjorie Boulton)
- 30) Kiel nomiĝas la Asocio de la junuloj ? (TEJO)
- 31) Kiun edzinigis Zamenhof ? (Clara Zilbernick)
- 32) Kiu sviso verkis facillingvaj krim-romanojn ? (Claude Piron)
- 33) Kiu artefarita lingvo jam ekzistis, kiam esperanto estis prezentita ? (Volapük)
- 34) En kiu jaro eldoniĝis la Fundamento de Esperanto ? (1905)
- 35) Kiu fondis UEA, Universala Esperanta Asocio ? (Hector Hodler)
- 36) Kiam fondiĝis UEA, Universala Esperanta Asocio ? (la 28-an de aprilo 1908)
- 37) Kiu fondis SAT, Sennacieca Asocio Tutmonda, en 1921 ? (Eugène Lanti)
- 38) Kiu anglo skribis la verkon " La Infana Raso " en 1958 ? (William Auld)

Ne forgesu, ke la Informilo estas **via ilo**. Dankon pro sendado al ni de viaj originalaj artikoloj, antaŭ la 10-a de aŭgusto. La redakcio

Laŭzana Esperanto-Societo

Société Lausannoise d'Espéranto

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 657 14 56

esperanto@isuisse.com <http://www.esperanto.ch/Lausanne>

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

informilo

Junio, 2007 N-ro 06

**De vendrede 22-a de junio 2007
ĝis dimanĉe la 24-a :
Somera ekskurso :
enĉaleda semajnfino**

**Du vendredi 22 juin
au dimanche 24 juin 2007
Excursion d'été :
fin de semaine au chalet**

Kalendaro 2007

22-24/06/07 enĉaleda semajnfino (legu paĝojn 5+6)
lun 03/09/07 decidota (*)

(*) : en la stacidomo de Laŭzano ĉe la unua etaĝo, super « La Bufedo » je la 20-a

TEMARO

Kaserolaj "Babetbabilajoj": Siropo de sambukaj floroj (eo)	2
Raporto pri Vojaĝo tra Hungario 08/01/07 (eo)	2
La invitado	3
Malkovru la retan esperanton (2) (eo)	4
Raporto pri la kunveno de la 7-a de majo 2007 (eo)	5
Semajnfino enĉaleda (eo)	5
Fin de semaine au chalet (fr)	6
Raporto pri la kunveno de la 2-a de aprilo 2007 (eo)	7

Laŭzana Esperanto-Societo

Kaserolaj "Babetbabilaĵoj"**Siropo de sambukaj floroj**
Sirop aux fleurs de sureau

Latina nomo : Sambucus nigra (sureau noir).



Arbustoj de sambuko kreskas ĉie en nia lando kaj nepre en ĥeĝoj kaj rande de arbaroj. Meze de majo ekmalfermiĝas iliaj belaj blankaj kaj mirinde parfumitaj floroj. Tiuj floroj tre utilas por pretigi kremajon, ili anstataŭas la vanilon, kiam oni preparas vanilan kremon. Sekigitaj, ili donos guston al viaj kukoj kaj infuzaĵoj (ankaŭ por kuraci malvarmumon).

Kvanto por poto de 1.5 l

20 (cirkaŭ) umbeloj de floroj de sambuko
2 ekokultivatataj citronoj
1.25 kg sukero
15 gr. citrata acido
1 l varmega akvo

**Preparo**

- Plenigu grandan vitran poton je floroj de sambuko (eltiru la verdajn branĉetojn, alie ili transdonos gustaĉon de herboj al via siropo).
- Aldonu la 2 lavitajn citronojn tranĉitajn laŭ 6 partoj.
- Verŝu 1 l da varmega akvo kaj lasu ripozi la tuton sune (apud fenestro aŭ sur balkono kiam sunas) dum 2 tagoj.
- Filtru vian sukron kaj aldonu po 1.25 kg da sukero por 1 l da likvaĵo kaj 15 gr. da citrata acido.

Per kulero, movu vian siropon ĝis la sukero fandiĝos.

- Verŝu en botelojn, ŝtopu ilin kaj lasu ilin sune ankoraŭ dum 3 tagoj.
- Konservu tiun siropon en freŝa loko (kelo, fridujo).

Dum la varmaj someraj tagoj vi vere plezure trinkos tiun siropon. Vi uzos ĝin ankaŭ por pretigi, ekzemple, fragojn en salato kun iom da mentaj folioj aŭ verŝu 1 kuleron en glason da blanka vino aŭ ĉampano kaj vi ricevos bongustan aperitivon.

Je via sano !
Elisabeth de Mestral

Raporto pri Vojaĝo tra Hungario

Lunde la 08-an de januaro, Charlotte kaj Gyözö vojaĝigis nin tra Hungario per libroj kaj fotografioj. Jam delonge mi pensis skribi ion pri tiu gvidita vizito, sed estas malfacile resumi tian vojaĝon per nur kelkaj vortoj.

Ni do ekiris de nia laŭzana stacidomo por nin retrovi ĉe la nordorienta parto de Hungario, en la Szalajka Valo, inter terasaj



Gyözö, Charlotte kaj amiko ilia.

QUI : Les premiers à payer seront les premiers inscrits. Les places sont limitées. Donc, virez rapidement au CCP 10-26785-8 la somme de vos nuitées en précisant "chambre" ou "dortoir". Vous pouvez également vous inscrire par courriel à esperanto@citycable.ch. En cas de désistement, seule la moitié de la somme sera remboursée.

DATE LIMITE : La date limite d'inscription est le lundi 18 juin. Ensuite, il ne sera plus possible de s'inscrire au souper du samedi soir.

Nous nous réjouissons de vous voir avant l'été pour des "avant-vacances".

Amicalement vôtre.
Le comité de LES.

Lunde, la 2-an de aprilo

Laurent bonege ludigis nin per Loto, kiu enhavis demandojn pri vortaro, gramatiko kaj historio. Jen la historiaj demandoj, pretigitaj de Nancy :

- 1) Kiu fama svisa esperantisto mortis en 1962 ? (Edmond Privat)
- 2) Kiu kreis la Centron de Dokumentado kaj Studo de la Lingvo Internacia en La Chaux-de-Fonds antaŭ 50 jaroj ? (Claude Gacond)
- 3) Kie okazis la unua kunveno de SES ? (en Rolle, la 27an de septembro 1903)
- 4) Kiu esperanta organo kaŝiĝas sub la literoj IFEF ? (Internacia Fervoja Esperanto Federacio)

5) Kiu fama verkisto havas la pseudonomon Kabe ? (Kazimierz Bein)

6) Kion fondis Edmond Privat la 14an de julio 1925 en Ĝenevo ? (Radio-Genève)

7) En kiu jaro Zamenhof konigis sian lingvon ? (1887)

8) Kiu estis nomita " La dua patro de esperanto " ? (Louis de Beaufront)

9) Kio estis nomita Grabowski ? (La patro de la esperanta poezio)

10) Kiu estis la antaŭnomo de Lapenna, fama iama prezidanto de UEA ? (Ivo)

11) Kiu skribis la verkon " Kiel akvo de rivero " ? (Raymond Schwarz)

12) Kiu fama filozofo inspiris Zamenhof por krei esperanton ? (Leibnitz)

13) En kiu poemo de Zamenhof troviĝas : " Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan " ? (La vojo)

14) Kiu unue tradukis Hamlet, kaj en kiu jaro ĝi aperis ? (Zamenhof, en 1894)

15) Kiu ĝeneva filozofo konsilis la junajn Hector Hodler kaj Edmond Privat inter 1903 kaj 1906 ? (Ernest Naville)

16) Kiam naskiĝis Zamenhof ? (la 15-an de decembro 1859)

17) Kiam mortis Zamenhof ? (la 14-an de aprilo 1917)

18) Kiujn antaŭnomojn havis Zamenhof ? (Lazaro-Ludoviko)

PREZO : Por la semajnfino (du noktoj kaj manĝo sabate vespere kaj dimanĉa tagmanĝo), po 65.- por persono en 2- aŭ 4-lita ĉambro aŭ po 45.- por persono en dormejo (10-lita ĉambro). Senpage por la junuloj ĝis 16-jaraĝa. Kunprenu viajn litaĵojn aŭ dormsakon.

ARANĜOJ : Se vi ne povas partopreni la tutan semajnfino, kontaktu François telefone (076 411 14 55) **ekde la 5a de junio** por detaloj.

KIUJ : La unuaj pagintoj estos la unuaj registritaj. La loko estas limigita, do rapide sendu perpagile (10-26785-8) la sumon pri via(j) tranoktado(j) notante aŭ "ĉambro" aŭ "dormejo". Ankaŭ eblas aliĝi retpoŝte al esperanto@citycable.ch. Se vi nuligos vian aliĝon, nur la duono de la mono revenos al vi. Ni plezuriĝas vidi vin antaŭsomere en "montaraj antaŭferioj".

LIMDATO : La limdato por la aliĝo estas lundo la 18-a de junio. Poste ne plu eblos aliĝi al la sabata vespermanĝo.

Amike via,
La LES-komitato

Fin de semaine au chalet du vendredi 22 au dimanche 24 juin 2007.

OU : Le chalet construit par les Cheminots pour la sobriété s'appelle "Notre Abri". Il possède 30 lits en chambre ou en dortoir. Il domine le lac Léman dans les montagnes au-dessus de Montreux - Blonay en face de l'Hôtel de Sonloup. Il est at-

teignable en voiture ou en train jusqu'à Chamby. Les propriétaires "La Fondation des Oliviers" demandent qu'aucun alcool n'entre dans le chalet.

QUOI : La Société lausannoise d'espéranto vous invite à venir passer cette fin de semaine avec nous. Diverses activités seront proposées, telles qu'un atelier cuisine, des cours d'espéranto, des jeux et promenades. Le programme détaillé sera disponible sur place.

QUAND : Vendredi 22 dès 18h jusqu'à dimanche 24 après les nettoyages.

COMMENT : Le souper du vendredi, les déjeuners du samedi et du dimanche, et le dîner de samedi seront organisés par chacun. Le samedi soir, nous nous régalerons du repas préparé par l'atelier cuisine.

A LA FIN : Les nettoyages commenceront juste après le repas de midi du dimanche.

LE PRIX : Pour le week-end (2 nuits et repas du samedi soir et dimanche midi), par personne adulte : Fr 65.- en chambre de 2 ou 4 personnes et Fr 45.- en dortoir (10 personnes). C'est gratuit pour les jeunes jusqu'à 16 ans. Prenez vos draps et taies d'oreiller ou votre sac de couchage.

ARRANGEMENTS : Si vous ne pouvez pas participer à l'entier de la fin de semaine, contactez François par téléphone (076 411 14 55) **dès le 5 juin** pour connaître les détails.

kaskadoj, lagetoj, fontoj, kaj mirinde verda kaj kvietata naturo.

Poste estis vagado tra la tuta lando, inter Nyiregyhaza (preĝej-plena urbo), Debrecen (dua plej granda urbo, ĉefurbo de la Granda Ebenaĵo), Győr (okcidenta parto, ĉe renkontejo de tri riveroj), Pannohalma (konstruita sur monteto, gastigas grandegan bibliotekon kun 350 mil libroj), Bakony (en la montaro) kaj tiel plu ĝis Pécs (fondinta antaŭ 2000 jaroj).

Dankon al Charlotte kaj Gyözö por ilia gvidado en lando nepre vizitenda.

Laurent

La invitado

Mia edzo, niaj du knaboj (kvin- kaj okjaraj) kaj mi estas invititaj ĉe juna, seninfana paro. En la lifto de ilia pluretaĝa domo, ni klarigas kelkajn bazajn ĝentilec-regulojn kiel : salutu kordiale, se vi ne ŝatas la pladon, ne diru, ke la manĝaĵo estas aĉa sed ke vi bedaŭrinde malŝatas...

Do en ilia hejmo niaj bravaj, belaj knaboj kun hararo perĝele starigita salutas kaj tuj inspektas la tutan apartamenton. "Aĥ, mi vidas pomkukon en la kuirejo! Mi malŝatas pomkukon!" Nur mi aŭdas la voĉeton kaj ne reagas.

En la salono tronas belega granda akvario kaj nia etulo salutas la fiŝetojn vigle frapetante la vitron. La gastiganto klarigas afable, ke li estas preparinta tiun akvarion ekde

kelkaj semajnoj, ke la fiŝoj estas tre delikataj kaj bezonas longan alklimatiĝon al la nova mikrosistemo. Mi mallaŭte preĝas, ke la multekostaj, apenaŭ videblaj fiŝoj transvivu la vesperon sen korokrizo.

"Aĥ, mi vidas katon!", subite du bruaj rakedoj ĉasas la malfeliĉan beston, kiu kaŝas sin sub la lito kaj pacienas tie longtempe. La dua renkontiĝo post unu horo daŭras iomete pli longe ol la unua, sed la kato ne multe ŝatas la ludmanieron de la knaboj. "Kial la kato ne kaptas la elteksaĵan muson, kiun ni ĵetas al ĝi?" Malgraŭ la nesukceso la besto interesas ilin: "Ĉu la kato mortos, se ĝi falos el la kvina etaĝo?"

La manĝo estas preta kaj ni sidas ĉetabele. La gastigantino servas la terpomkaĉon. La okjarulo gustumas du gramojn el ĝi: "Ne estas malbone, sed mi satas." Nun la viando "osso buco" estas servita. Dum nia amikino enmetas la ruĝan viandpecon en la teleron, la glueca medolo ekglitas el la ostoj. Apud mi, mi aŭdas teruritan flustraĵon: "Panjo, ĉu tio estas la cerbo?!" Konklude, ĉiu knabo trinkas du litrojn da "coca-cola" kaj manĝas panon.

Kiam ni ekgustumas la vinon, nia knabeto finas manĝi kaj foriras lavi siajn manetojn (bone edukita, ĉu ne?). Dum li pasas malantaŭ nia gastigantino, li kantas gaje: "Granda pugo!"

Longa silento, kie aŭdeblas muŝflugo.

Feliĉe, ŝi ridante reagis : "La vero eliras el la buŝo de la infanoj !"

Mara Bartoli
Aprilo 2007

Malkovru la retan esperanton (2)

Pasintmonate, mi proponis al vi kelkajn uzendajn vortojn pri la reto. Jen ni povas komenci la esploron de la esperanta reto. Mi pensas, ke oportunas komenci pri la eblecoj lerni nian internacian lingvon perkomputile.

Se vi jam lernis esperanton, longe antaŭ la unuaj komputiloj, vi povas malkovri tiujn paĝojn nur por pli bone konsili novajn esperantistojn. Vi, ankoraŭ komencantoj, povas tute simple lerni aŭ plibonigi vian esperanton.

Unue, mi nepre devas paroli pri senpaga programo, kion vi povas elŝuti sur tiu paĝo : <http://www.cursodeesperanto.com.br/bazo/index.php?fr> (la paĝo estas skribita en la franca). La kurso konsistas el 12 lecionoj, kiuj montras al vi la tutan esperantan gramatikon per diversaj klarigoj aŭdeblaj kaj legeblaj. Multe da ekzercoj estas tuj kontrolataj de la programo, sed vi ankoraŭ povas ekzerciĝi skribante kaj sendi viajn respondojn al korektisto per retpoŝto. Mi ne povas ĉion prezenti ĉi-tie, sed mi povas konsili tiun programon. Certe eblas lerni esperanton. Post la dekdua leciono, vi ekzameniĝas kaj vi povas ricevi diplomon, se vi sukcesis.

Sur la paĝo, vi trovas la elŝuteblan ligan (bluskribitan). La programo nomiĝas "kurso.exe". Kiam la programo estas elŝutita, vi devas nur duoble alklaki sur ĝi por ĝin funkciigi. Poste vi havos novan fenestron sur via ekrano. Ĉio estas klarigita en la franca.

Komprenoble troveblas ankaŭ aliaj retejoj por lerni. Tre praktika estas ikurso de "esperanto-jeunes" en 10 lecionoj, <http://ikurso.esperanto-jeunes.org/fr/cge/intro.php?temo=intro>. Tio estas tre simila al "kurso.exe" kaj vi povas korektigi viajn ekzercojn. Sed sur tiu paĝo vi havas ion interesan : la tutan tekston de "Gerda malaperis" kun klarigoj, vortlistoj kaj ekzercoj ligitaj kun la teksto. Vi trovas ankaŭ aliajn tekstojn, ekzemple "Lasu min paroli plu" de Claude Piron, por plibonigi vian lingvon.

Sur tiu paĝo vi povas elŝuti ĉion, kio estas klarigita ĉi-supre : <http://ikurso.esperanto-jeunes.org/helpo.php?temo=elsxutoj> : la programo kurso.exe, la tekstoj kaj kursoj menciitaj en pdf.formato.

Aliloke, la retejo "Lernu" proponas diversajn kursojn por komencantoj kaj pli malfacilajn kursojn. Ĉiuj estas prezentataj sur tiu paĝo : <http://eo.lernu.net/kursoj/index.php>. Mi ne provis ĉiujn, sed ĝi ŝajnas interesa malgraŭ malpli da interaktivaj ekzercoj.

Se vi havas ankoraŭ fortojn por studi, iru al la retpaĝo de Bertilo Wennergren kaj lia "Plena manlibro

de esperanta gramatiko" : <http://bertilow.com/pmeg/>. Vi povas elŝuti la tutan libron aŭ konsulti la enhavon per la indekso. Do, malkovru kaj lernu !

Daniel Schöni Bartoli

Lunde la 7an de majo

Dominique fripone pretigis proverbojn tradukitajn de Zamenhof, ŝanĝante po unu vorton en ĉiu proverbo. Ne facilis trovi la veran frazon, ĉar li lerte laboris por testi nin !!!

Jen ekzemploj :

Per oreloj ne per okuloj *azenon* elektu ! (Solvo = Per oreloj ne per okuloj *edzinon* elektu !)

Espero logas, espero *utilas*. (= Espero logas, espero *mensogas*)

Feliĉo hodiaŭ karesas, morgaŭ *kisas*... (= forgesas)

Langa *kiso* plej profunda ! (=vundo)

Plena estas la infero de *plezurigaj* aferoj. (= promesitaj)

Kiel oni *ternas*, tiel oni dormas. (= sternas)

Jen tiu, kiu plej grumblogis nin :

Virino bonorda estas *gaja kaj brua*. (= muta kaj surda !!!)

Poste ni devis diskuti, kaj eĉ kvereleto pro malsamaj opinioj pri proverboj. Ekzemple : Ŝteliston oni batas, ŝtelegiston oni ŝatas. (= la eta ŝtelisto estas akuzita (eble li bezonis panon por la ege malriĉa familio...), sed ofte la granda ŝtelisto daŭre kuras... Ekzemple : bankisto, ŝtatestro...)

Ni bone laboris en agrabla etoso. Dankon Dominique ! Ĝis !!!

Nancy Fontannaz

Semajnfino enĉaleda

Semajnfino enĉaleda de vendrede, la 22-a ĝis dimanĉe, la 24-a de junio 2007.

KIE : La ĉaledo konstruita de la nedrinkantaj fervojistoj kaj nomita "Nia rifuĝejo – Notre Abri" posedas 30 litojn, en ĉambroj kaj en dormejo. Ĝi superas la lemanan lagon en la montoj super Montreux – Blonay vidalvide al la Sonloup hotelo. Ĝi estas atingebla peraŭte kaj per trajne ĝis Chamby. La posedantoj "La Fondation des Oliviers" petas, ke neniuj alkoholaĵoj eniru la ĉaledon.

KIO : La Laŭzana Esperanto-Societo invitas vin partopreni tiun semajnfino. Diversaj aktivecoj estos proponitaj, kiel kuirado, esperanto-kurso, ludoj kaj promenadoj. La detala programo disponeblas surloke.

KIAM : De vendrede la 22-a ekde la 18-a ĝis dimanĉe la 24-a post la purigado.

KIEL : La vendreda vespermanĝo, la sabata kaj dimanĉa matenmanĝoj, kaj la sabata tagmanĝo estos organizataj individue. Sabate vespere, ni kune festenos dank'al la kuirema grupo.

FINE : Ni purigos la lokojn dimanĉe, ĵus post la tagmanĝo.